


---

---

# LA DEKSEPA



Bulletin Mensuel Espérantiste  
servi gratuitement aux membres de la Section du XVII<sup>e</sup> Arr<sup>t</sup>  
du Groupe Espérantiste de Paris.

---

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : **H. de COPPET**  
179, Boulevard Pereire, Paris.

---

ABONNEMENT : 1 franc par an. -- Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :

Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

---

## Groupe Espérantiste de Paris - Section du XVII<sup>e</sup> Arrondissement

---

Réunions amicales tous les Mercredis soirs, à 9 heures,  
Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris. Entrée particulière.  
Téléphone 530-16. Métro : Pereire.

---

### Prochaines causeries.

- 8 Novembre. — La monato Esperantista. S-ro H. van Etten.
  - 15 Novembre. — Ĝardenkulturado. S-ro Cagas.
  - 22 Novembre. — Literatura festo. S-ro Devjatnin.
  - 29 Novembre. — Dauphiné (lumbildoj). S-ro G. Daniel.
  - 6 Décembre. — La monato Esperantista. S-ro R. Bollack.
- 

### Notre Dîner mensuel.

Les prochains Diners mensuels de la Section auront lieu  
les Mercredis 8 Novembre et 6 Décembre 1911, à 8 heures  
précises du soir, Café de la Gare, 6, place Pereire, Paris.

Prix : fr. 3,25 (boisson et pourboire compris).

---

## Assemblée Générale.

---

L'Assemblée Générale Annuelle de la Section a eu lieu le Mercredi 18 Octobre 1911, au Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris. La séance était présidée par M. Henri de Coppet, président.

Les décisions suivantes ont-été prises :

1° La Section s'affilie directement à la S. F. P. E. par 18 voix sur 20 votants (1 voix se prononce pour l'affiliation par l'intermédiaire de la Fédération Espérantiste de la Région Parisienne, et 1 voix s'abstient).

2° Pour soutenir l'U. E. A., la Section deviendra pour 1912 « Esperantia Entrepreno ». Cette décision est prise à l'unanimité.

3° L'élection du tiers des membres du Comité donne les résultats suivants :

Sont élus : MM. Bollack (20 voix), Daniel (18 voix), Chilard (12 voix), Van Etten (12 voix).

Viennent ensuite : MM. Oblin (9 voix), Grosset (8 voix), M<sup>me</sup> Trouillon (1 voix).

\*  
\* \* \*

Le Comité s'est réuni après la séance. Il se trouve composé, après l'élection des membres du Bureau, de la façon suivante, pour un an :

Président : M. Henri de Coppet; Vice-Président : M. Ollivier; Secrétaire : M. Robert Bollack; Trésorier : M. Gilbert Daniel; Bibliothécaire : M. Henry van Etten; Membres : M<sup>lle</sup> Talvat; MM. E. Lemoine, Millien, G. Lhermitte, Poublanc et Chilard.

M. de Coppet a été nommé délégué de la Section à la S. F. P. E.

*Le Secrétaire :*

ROBERT BOLLACK.

---

## INTER NI

---

Jen nova rubriko! Ĝia celo? Sciigi en ne pli ol 3 linioj, niajn samideanojn forestantajn pri la interna vivo de la Sekcio.



Antaŭnelonge, ni havis la plezuron akcepti kelkajn ali-landajn Esperantistojn; inter ili, S-ron Devjatnin, la kon-atan rusan Esperantistan verkiston.



La biblioteko estas nun en la manoj de S-ro van Etten. Neaĉetemuloj! ne venu ĉe nin!!!



Nia komitatano, S-ro Lemoine, donacis al nia Biblioteko 2 ekz. de la laste aperinta verko de S-ro J.-M. Picard: *L'Esperanto à l'Ecole*. Jen imitinda ekzemplo. Tutkorajn dankojn!



Ĉe nia ĝenerala kunveno oni nomis S-ron Marcel Cousens, honora membro de nia Sekcio, pro la senĉesa kunlaborado, kiun li alportis al ni de la tago de lia enskribigo.



Mi konstatis plezure, ke multaj el niaj sekcianoj faris dum la somero grandajn progresojn en la lingvo.



La Grupo de Paris ne estis reprezentita, tiun ĉi jaron, ĉe nia ĝenerala kunveno. Kial?

Fuŝisto.

---

## LA MONATO ESPERANTISTA

La Redakcio de la « Dek-Sepa » pensis, ke estus interesege por multaj el siaj gelegantoj esti informitaj pri la agado de Esperantistoj en diversaj landoj, kaj por atingi tiun celon, necese estas tralegi multajn ĵurnalojn. La « Dek-Sepa » komisiis tiun rubrikon al S-roj Robert Bollack kaj Henry van Etten, kiuj laŭvice raportos resume pri la faktoj aŭ la artikoloj de la Esperantistoj, ĉu por la propaganda, ĉu por la esperantia (U. E. A.) fakto. (N. d. l. R.)

Novajo ankoraŭ, vi diros? Jes, estas. Almenaŭ estas provo, se ĝi plaĉas al vi, ni ĝin ĉiumonate daŭrigos; se ne, ni ĝin forlasos.

Tiun ĉi fojon mi resumas la faktojn okazintajn de Junio ĝis la Kongreso; ĉar pri tiu lasta ne ankoraŭ longe raportas ĉiuj gazetoj, kiujn ni kutime ricevas.

— Dum Junio okazis en Beauvais, la tagon mem de la urba kaj regiona festo Jeanne-Hachette, esperanta kunveno, kiu certe havos efikon en la estonteco por nia movado.

— En Limoges, S-ro Justin Godard, franca deputato, prezidis la kunvenon de la « Paix par le Droit ». Li parolis tiuokaze pri la utileco kaj taŭgeco de nia lingvo.

Vi scias, ke S-ro Justin Godard estas prezidanto de la Esperantista Grupo je la Franca Deputatejo.

— La urba konsilantaro de Grenoble decidis donaci 100 frankojn da premioj al la infanoj, kiuj sekvus laŭvolan kurson de Esperanto, kaj, por fini la francajn sciigojn, mi diros al vi, ke S-ro Marcel Sembat, deputato de Paris, akceptis ne la honoran prezidon, sed la efektivan de la Verda Stelo, Grupo Esperantista de Montmartre, kiun vi ĉiuj konas.



— Eksterlande, la nacia germana kongreso okazis en Lübeck. Laŭ la raporto de D-ro Kandt estas kalkulataj en G. E. A. 206 grupoj kaj 5881 membroj. Deziresprimo estis akceptata, ke Esperanto estu permesata same kiel alia lingvo por la provoj de la ekzamenoj plenumotaj por la unujara milita servado. Tia deziresprimo estis sendata al la *Bundesrath* (*Bundesrath* havas la rolon de nia franca *Sénat*).

Bonan sukceson al niaj amikoj germanaj!

— La nacia itala kongreso okazis la 25-an de Majo en Genova. Unu deputato parolis por Esperanto dum la kongreso kaj tri aliaj ĉeestis. La registaro tute estis favora al la organizado de la kongreso. La Federacio Esperantista Itala estis fondata kaj nian francan S. F. P. E. reprezentis S-ro L-to Martin. 400 kongresanoj ĉeestis.

— En Charleroi okazis la belga kongreso nacia, la 4-an kaj 5-an de Majo. La ĉefa laboro konsistis pri la preparado de la Sepa.

— La 4-an kaj la 5-an de Junio okazis la brita kongreso kaj niaj liberaj samideanoj de Angllando sendis al D-ro Zamenhof la proteston sekvantan :

“ La B. E. A. en ĝenerala kunveno malaprobas la proponon starigi specialajn oficialajn delegitojn por kontroli la aferojn de la Esperantistoj. ”

Ĉar tiu demando de reprezentantaro ankoraŭ multe okazigos polemikojn, kaj ĉar la projekto de D-ro Zamenhof ne estas akceptita definitive, sed provizore malgraŭ tute « senorda diskutado » (laŭ S-ro Hodler), mi ne insistas hodiaŭ ; mi nur rimarkigas al vi, ke la Angloj volas posedi sian liberecon eĉ pri la esperanta vidpunkto ; ni, liberamantoj devas tion zorge eviti.

Ĉe la angla kongreso ĉeestis 400 samideanoj.



Nun mi parolos al vi pri faktoj ne pure esperantistaj, sed kiuj pruvas la utilecon de nia kara lingvo.

La Mondkongreso de la Rasoj okazis en London, la 26-an de Julio 1911, kaj D-ro Zamenhof sendis longan raporton pri la enkonduko de nia lingvo en la kongresoj estontaj. Inter la subskribintoj de la deziro ni rimarkas Senatanon belgan La Fontaine, Generalon Legitime, eksprezidanto de la Respubliko Haiti.

Jen la unuaj vortoj de Doktoro Zamenhof :

“ Estimataj Sinjoroj ! Kvankam la nomo de via kongreso estas « Kongreso de *Rasoj* », tamen permesu al mi, ke mi parolu ne sole pri *rasoj*, sed ankaŭ pri *gentoj*, ĉar ambaŭ egale signifas etnologian grupon da homoj kaj diferencas nur per sia amplekso. La samaj rilatoj, nur eble en pli aŭ malpli granda mezuro, regas inter la gentoj, kiel inter la rasoj, kaj

tre ofte estas malfacile diri, ĉu tiu aŭ alia homa grupo prezentas raŝon aŭ genton.

La reciproka batalado inter la diversaj homaj rasoj kaj gentoj estas la plej granda malfeliĉo de la homaro. Se la Kongreso de Rasoj povus trovi ian rimedon, por forigi, aŭ almenaŭ malfortigi la reciprokajn malamon kaj bataladon inter la homaj gentoj, ĝi povus esti kalkulata al la plej gravaj el ĉiuj kongresoj, kiuj iam ekzistis. Sed, por tion atingi, la kongreso devas ne kontentigi sin per teoria rezonado, kiu forflugas sencele, kiel vento, ne serĉi vanajn kompromisojn, kiuj flikas unu lokon, krevigante alian; ĝi devas antaŭ ĉio esplori kaj trovi la *kaŭzon* de la ekzistanta malbono kaj serĉi rimedon, por forigi, aŭ almenaŭ malfortigi tiun kaŭzon. "...

Kaj poste D-ro Zameuhof rimarkigas, ke nek politikaj cirkonstancoj, nek malproksimeco de la landoj, nek la korpo, nek menso malhelpas la harmonion inter homoj, sed nur ilia malkomprenado kaj vi antaŭvidas lian konkludon.

— Ankaŭ aperis en « Le Monde Espérantiste » bonega artikolo de S-ro Paul Fruictier, unu el la unuaj fideluloj de la Esperantistaro. Multaj el ni konas aŭ devas koni lian « Sintakson de Esperanto ».

El tiu artikolo, titolita « Kiel ni venkos ? », mi citas nur la konkludon :

“ Nediskutebla principo devus regi ĉiujn agojn de l'Esperantistoj : *nenu rajtas paroli pri ŝanĝo en la lingvo*. La Lingva Komitato havas taskon naturan kaj ĉefan : konservi la unuecon de la lingvo ; nu, por plenumi sian rolon, laŭ mia opinio, ĝi ne havas alian rimedon, ol severe malpermesi al ĉiu ajn Esperantisto ataki la Fundamenton aŭ paroli pri plibonigoj ; kaj ĝi devas difini specialan Komision, kiu zorge legu ĉiujn verkojn kaj gazetojn kaj signalu, kiel malbonajn kaj nelegindajn, ĉiujn ne korektajn eldonadojn.

Mi scias, ke oni kulpigos min pri malprogresemo kaj tiraneco, sed mi, post dekjara laborado por Esperanto, konscias, ke nur severega disciplino povos konduki nin al la fina venko, savante nin de falado en senĉese renaskigantajn skismojn. Cetere la disciplino, kiun oni propravole trudas al si mem, estas nur forta instigilo de l'energio. Neniu estu devigata fariĝi Esperantisto, sed se li farigas tia, li konsentu ankaŭ ĉiujn devojn trudatajn de tiu ĉi eco kaj li oferu sin al la ĝenerala bono de l'homaro, kiun ni volas. ”

Estu trankvila, S-ro Fruictier, tiun lingvan disciplinon ni ne timas : ĝi estas la esenco de nia afero ; organizo nacia kiel eble plej libera, disciplino lingva kiel eble plej severa, tiu estas kaj estos nia ĉiama celo, kaj neniu homa forto malhelpos la Fundamentistojn tiun programon plenumi.

Paris, la 28-an de Septembro 1911.

ROBERT BOLLACK.

---

## NI VIVU ESPERANTON

---

La problemo, kiel plej efike zorgi pri la varbitoj, havas ja grandan intereson por ĉiuj kondukantoj de grupoj, kaj estas unu, kiu jam de longe okupadis la atenton de ĉiu fervora samideano. Ĉar de la maniero, laŭ kio oni entreprenas ĝian solvon, dependas ja la sukceso aŭ malsukceso de grupo, la loka progreso aŭ malprogreso de nia afero.

Por certigi al Esperanta grupo aŭ societo daŭre vigan kaj fervoran ekzistadon, oni devas planti ĝiajn radikojn en tero pli profunda. Por ke Esperanta grupo fortike kresku, por ke ĝi konservu kaj pligrandigu la entuziasmon de siaj unuaj tagoj, ĝi devas ĉerpi siajn fortojn el la internacia vivo mem. Alivorte, ĝian ĉiun faron kaj laboron kaj manifestacion devas inspiri intensa konscio kaj sento de la fakto, ke Esperanto — laŭ la trafa frazo de Privat — estas « vivanta lingvo de vivanta popolo ».

Tradukita en la lingvon de l' ĉiutagaj aferoj, tio signifas, ke Esperantista grupo ne povas vere vivi kaj kreski, se ĝiaj membroj ne partoprenas aktive, ĉiu laŭ sia propra kapablo aŭ prefero, en la komuna Esperantista vivo internacia. Kiel ĉiu nacia popolo havas sian nacian vivon, sian historion, siajn tradiciojn, sian literaturon, siajn naciajn idealojn kaj taskojn, siajn problemojn, siajn malfacilaĵojn kaj feliĉojn, tiel same estas, sed pli noble kaj vaste, ĉe la popolo Esperantista. Ankaŭ ĝi sian historion havas, siajn tradiciojn, siajn instituciojn, siajn taskojn, siajn problemojn, siajn ĝojon kaj malĝojojn, siajn revojn, sian novan senton, sian belan esperon pri fratiganta homaro. . . . Jen la riĉa heredaĵo, al kiu estas vokata ĉiu samideano.

Kiu eĉ por momento antaŭsentis en sia brusto la varman

pulsegon de tiu pli vasta vivo internacia, kiu eĉ por momento ekvidis spirite la plenumigon de tiu altega ideo, por tiu la vivo neniam plu povas iri laŭ la iama malnova modo. Li konscias jam la estiĝon de vivo pli bela, ekspiras jam aeron pli fresan, pli sanigan, eksopiras jam al pli vastaj horizontoj de pensado kaj agado, sentas sin pioniro de nova epoko.

Ĉiu, kiu efektive partoprenis en iu el niaj kongresoj, bone konas, kian potencan senton de viva entuziasmo kaj ĝoja kunlaborado por bela celo oni havas ĉe tiuj internaciaj festoj. Oni scias, kun kia fervoro oni revenas al la grupaj kunvenoj, al la ordinaraj ĉiutagaj laboroj. Ĉiu faro kaj tasko, eĉ la plej malgranda, de la grupa vivado, havas novan kaj pli vastan signifon, ĉiu peno ŝajnas ĉerpi novan forton el tiu granda komuna vivo, kiun ni ĵus spertis, kaj kies potencaj tonoj ankoraŭ vibras en niaj koroj.

Vidate en sia rilato kun tiu pli vasta agado, nia grupo jam ne plu ŝajnas ia malgranda kaj malfortika rondeto izolita, sed fariĝas grava elemento en organismo tutmonda. Ĝiaj membroj jam ne plu estas sinjorinoj kaj sinjoroj tiaj kaj tiaj en provinca urbeto, sed kamaradoj kunlaborantaj en la vicoj de vasta paca armeo, kies trankvila paŝado, neŝancelebla, jam skuas la mondon... Jen la vera tasko de la kondukantoj de niaj grupoj: konsciigi al la grupanoj ilian samideanecon, sentigi al siaj varbitoj kaj lernantoj, ke ili estas kamaradoj kun frataro tutmonda, pioniroj en tiu nova lando senlima, Esperantujo!

Efektive, kiam unufoje oni konscias vere, kian vastan rolon kaj utilon Esperanto havas kaj havos en la mondo,

KONTRAŭ  
M A R -  
MAL-  
SANO

**DELPHININE**

KONTRAŭ  
FERVOJ-  
MAL-  
SANETO

De l' DOKTORO FLASSCHEN.

Tiu ĉi farmaciaĵo, absolute sendanĝera, ricevis la **Grandan Premion** ĉe la Internacia Ekspozicio de Higieno, okazinta en Parizo en 1908.

Prezo de la boteleto : 10 fr. (4 S).

Aĉetebla ĉe S-ro **WEITZ**, 8, Rue de Duras, Paris  
kaj ĉe ĉiuj farmaciejoj.



oni jam ne plu spertas malfacilaĵojn, serĉante rimedojn por vigligi la intereson de la grupanoj, — pli malfacile ja estas elekti kaj aranĝi inter la multaj aferoj, kiuj sin prezentas. Kaj ankoraŭ ni nenion diris pri la ĝojoj de l' Esperanta korespondado, de l' vojaĝoj Esperantaj, de l' kolektado de postkarto, postmarkoj, ... Ĉi tie ni ne povas fari pli ol ektuŝi demandon tiel grandan, sed espereble ni sukcesis elmontri, ke Esperanto ne estas ia afero nur de lingvaj lecionoj kaj kursoj, sed kvazaŭ brilanta pordego al bela lando de noblaj kaj vastaj interesoj kaj idealoj, en kiu ĉiu samideano povas kaj devus labori, lando de interesoj kaj idealoj, kiuj nepre plilarĝigas la inteligenton, plivarmigas la simpatian kaj plialtigas la koron de ĉiu, kiu ĝin eniras. Nur se ni vivos Esperanton, vivados kaj kreskos niaj grupoj.

W. MANN.

(El « The British Esperantist ».)

## Bibliografio.

J. M. PICARD: **L'Esperanto à l'École.** Coulommiers (P. Brodard).

Jen bonega libro aperanta precize en la oportuna momento por montri al la malamikoj de nia lingvo, ke Esperanto kaj franca lingvo estas kunligataj per similaj gramatikaj reguloj kaj ke, dank' al Esperanto, la lernantoj povas *ellerni* la francan lingvon kaj ĝin pli korekte paroli poste.

Tiu libro havos, se ĝi estos akceptita de la registaro franca, grandan utilon en niaj lernejoj francaj, kaj S-ro Picard, modesta kaj fervora Esperantisto, estos havinta la honoron pli forte ankoraŭ antaŭen paŝigi nian lingvon.

Tiu libro estas aĉetebla ĉiumerkrede ĉe la biblioteko de la Sekcio de la XVII-a kvartalaro de la Grupo de Paris.

R. BOLLACK.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

## LA VERA TIZANO DE L' PASTRO DE DEUIL

preparita de S-ro Duvergier, en Argenteuil, mirinde efikas kontraŭ ĉiuj doloroj, reŭmatismoj, neŭralgioj, kontraŭ la aĝatakoj, la mallakso kaj la grasegeco.

La paketo : 1 Fr. 50 (Sm. 0,60)

==== Tuj ricevebla kontraŭ poŝtmandato. =====

Specimeno kaj broŝuro senditaj senpage tuj post demando al  
S-ro DUVERGIER, 9, Rue Laffitte, Paris.

## IDISTO

En sonĝo mi vidis Idiston  
Kun vangoj malsekaj de ploro,  
Kaŝ petis plorante li Kriston  
Pri venko, sukceso kaj gloro.

Li preĝis: « ho Kristo-Diido,  
Ne plu Esperanton subtenu;  
Subtenu aferon de l'Ido,  
La Idon vivigu kaj benu. »

Tiele preĝadis Idisto  
En sia ĉambreto ĉe tablo;  
Sed aŭdis subite de Kristo:  
« Foriru de mi, ho, Diablo! »

El la poemaro de  
TIFLISANO.

---

---

# DANUBO

Organo de la  
rumanoj kaj bulgaraj  
esperantistoj

Internacia monata gazeto (32 p., 16 × 24), nur en Esperanto.

Redaktata de speciala komitato, kun la kunlaborado de  
eminentaj diverslandaj esperantistoj.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO:

5, Str. I. C. Bratianu, BUCURESTI (Rumanujo).

Jara abono: 3,50 fr. (1,40 \$).

Specimena numero kontraŭ respondkupono.

---

---

Estas malfermita por la jaro 1912 abono al la gazeto

## La Ondo de Esperanto

(laŭ la adreso: 26, Tverskaja, Moskvo, Rusujo).

Dum la 4-a jaro de sia regula funkciado « La Ondo » SENPAGE donos  
al siaj abonantoj, krom 12 numeroj (16-20-paĝaj) la speciale por  
tiu celo tradukitan de S-ino M. Ŝidlovskaja ĉefverkon de rusa literaturo

« **Princo Serebrjanij** » de **TOLSTOJ**.

(352-paĝa, grandformata libreĝo, kies prezo por la neabonantoj estos  
afrankite Sm. 1,60).

Literaturaj konkursoj kun monpremioj. Portretoj de konataj Esperant-  
istoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio.  
Amuza fakoj. Korespondo tutmonda (poŝtk. ilustr.).

La abonpagon (2 rubl. = 2,120 Sm.) oni sendu al « Librejo Esperanto »,  
(26, Tverskaja, Moskvo, Rusujo) aŭ al aliaj Esper. librejoj, poŝtman-  
date, respondkupone, papermone aŭ per banktekoj.

# Moustiques ! Moustiques !! LE MOUSTIKOL

(Déposé)

Supprime instantanément les Démangeaisons occasionnées par les piqûres de MOUSTIQUES, GUÊPES, PUNAISES, PUCES, etc. — Le flacon : 1 fr. 50.

Vente en Gros : PIOT & LEMOINE, 117, rue Vieille-du-Temple, Paris.

## Pharmacie des Deux Mondes

A. LÉGER, Pharmacien de 1<sup>re</sup> classe

3, Rue des Tournelles - Bastille - Rue St-Antoine, 8

**PRIX LES PLUS RÉDUITS**

Livraison tous les jours dans PARIS et en BANLIEUE sans augmentation de prix. — Expéditions en PROVINCE.

Demander le **Catalogue** accompagné d'un petit manuel de *Médecine* et de *Pharmacie*, envoyé **gratis** et **franco** sur simple demande.

### HYGIÈNE de l'INTESTIN

### CONSTIPATION




Echantillons gratuits sur demande.

Refuser les contrefaçons comme on refuse la fausse monnaie.

Bien exiger la marque :  
Chatel-Guyon  
Miraton, France.

## FARINE LAVILLE

### FLEUR D'AVOINE LACTÉE



Médaille d'Argent

Médaille d'Or

Diplôme d'Honneur

« L'aliment d'avoine convient en tout temps, à tout âge, et à toute sorte de tempéraments. »

LÉMERAY

Ancien Doyen de la Faculté de Paris.

La Boîte : fr. 1,50, dans toutes Pharmacies et Herboristeries.



Véritable  
Sel Ferrugineux  
assimilable

DÉCOUVERT PAR  
**M. Maurice ROBIN**  
en 1881.

LE  
**Fer Robin**

est Souverain

CONTRE

l'ANÉMIE,  
la CHLOROSE,  
les HÉMORRHAGIES  
DE TOUTE NATURE

Active la nutrition et  
ne constipe jamais.

Chaque Flacon de ce  
médicament dépourvu de  
toute saveur, et qui se  
prend à la dose de 10 à 30  
gouttes par repas, dans un  
verre d'eau ou de vin, repré-  
sente une durée de trois  
semaines à un mois de  
traitement.

Pour éviter les Contrefaçons  
**EXIGER** le  
Nom de **ROBIN**

VENTE EN GROS :  
**13, Rue de Poissy, PARIS**

Le Gerant : E. OLLIVIER.